É 100% Regular
Os verbos podem ser aprendidos em 10minutos.
Se tomar bom conhecimento, vai se apaixonar !

GISTO 0611
Str. Esperanto, 880
Redaktas ottovaske@ibest.com.br
Donace por VK-ĉeestantoj.
Krom foraj loĝantoj R1,00

.....

DANĜERE FORGESA

Anstatŭ regi la komputilon, ĝi regas min.Tiel statas mia kapo. Jam dufoje mi estis tajpinta unu paĝon de Gisto kaj, subite la tuta teksto malaperis. Irinte al doktorino (En la urbo Montenegro) ŝi ekzamenis min kaj diagnozis:Alzhejmer en la komenco. Ŝi receptis medicamenton kaj ordonis reveni post unu monato, por evaluo. Tio signifas ke mi sekvas la ŝpurojn de nia kara R-kolego Eskovedo, la "Eskovinha" inter la kolegaro. Forpasis du semajnoj sed signo pri pliboniĝo ne montras sin. Multe mi mistajpas kaj devas reveni por korekto. Tio tre enuigas min kaj mi perdas la animstaton por ion entrepreni. "Ne oldiĝu!"...

Jen, do, la panoramo kiu vidigas sin al ĉi oldulo, des pli nuba ĉar, pri la konkurso proponita en Gisto 0511 ĝis hodiaŭ 23/6 neniu reago perletera aŭ e-mail atingis min. Timindas ke la 25/an montriĝos ke ĉiuj "forgesis" pri la konkurso kaj tio fariĝos la komencon de la fino de la gaŭĉa Verda Kafo pro la konstato ke neniu serioze interesiĝas pri ties enhavo kaj neniu el la rondanoj montris inklinon daŭrigi la Gisto-eldonadon. Certe mi miskalkulis utilon de Gisto, por liveri almenaŭ iom da tekstoj kiuj ofte memorigas pri la gaŭĉa E-movado, sen troa krokodilado.

Neniam mi pretendis montri senriproĉan lingvonuzon. Al mi mankas tia scio; mi celas reveki la kolegaron, ke ili ne tute ignoru la tempon eluzitan por lerni nian karan lingvon. Sen reagoj favoraj al la melankolia fino...

FLUGISTAJ MEMORAĴOJ

Neforgeseblajn aferojn mi travivis tial mi rekomendas al la gejunularo ĉirkaŭ 20-jaraĝaj: se vi decidis ne plu studi kaj ankoraŭ ne konkeris bonsalajran postenon, fariĝu flugist(in)o kondiĉe ke panjo vin permesos, ĉefe se vi regas la anglan, japanan, hispanan aŭ germanan lingvon aŭ, des pli bone, se vi scias pli ol unu el la menciitaj lingvoj. Sed, kiam en via kapo naskiĝas la emo imiti la birdojn, vi estu juna. Granda domaĝo estis ke kiam mi pensis fariĝi piloto, mi aĝis 27j tial, kiam mi proponis min, mi devis triste sciiĝi ke mi estis tro olda kaj estis fordankita. Dum 19 jaroj mi servis al la flugentreprenoj VARIG kaj KRUZEJRO do SUL kiel R-telegrafisto/flugnavigisto.

Unu el ĝuoplenaj ekskursoj estis, kiam oni devis tranokti en Bonaero kaj resti libera tutan merkredon. Tiam per tramo oni veturis al kajo de kiu ekiris grandaj boatoj al pluraj direkto laŭ la riverego El Tigre. La tuta skipo de Konver-aviadilo decidis kune navigi ĝis la malsato atingis nin. Ni tagmanĝi ĉe haveno kie haltis nia barko hazarde trovita, sur insulo. Kvankam mia kengo nun aĉe funkcias, eblas rememori ke la fiŝista vilaĝo tie nomiĝis Karapaĉai'. Nia tagmanĝo nur povis esti el fiŝo kaj ni elektis la doŭradon (kaptata en forte fluajakvoj) kun salikokoj, kiuj rajtis ŝvimi en amaso da bongusta vino. La tago estis belvetera. Memorindajn fotojn oni klikis. Ĉiuj gajaj kaj kontentaj decidis atendi venantan ŝipeton kiu kondukis nin revene al la ekirejo, ĝis venonta fojo, por alia irvojo kaj programo.

DORMEMO

Kiam Konver-motoroj sinkrone ronronadas, 3000m alte, sur tapiŝo el blankaj nuboj kiel neĝo, malfacilas teni la okulojn malfermaj, ĉefe post kiam la ŝtevardinoj disdonis la kutime bongustan tagmanĝon. Se la flugestro hazarde estis iu pedanta komandanto, tro postulema ril.al eroj dumflugaj kaj surprizis iun el la skipanoj kun la okuloj fermitaj, li kutimis tuŝi lian ŝultron kaj averti: por dormi estis kreita la nokto. Por tio jam estis preta en la buŝo la reago “mi nur ripozas la okulojn, sinjoro komandanto” – Ja vere, kun la aŭtomata piloto konektita, la danĝero ke la tuta skipo endormiĝos, fariĝas enorme granda. La devokonscio tion ne lasas okazi.

TEMPOMANKE

Bildigu al vi, karaj gelegantoj.Kvankam mi tenas enhejman helpantinon, al mi tre malfacilas restigi al mi sufiĉan tempon por plenigi du paĝojn da teksto kiom okupas Gisto. Mia edzino postulas ke mi restu daŭre proksime al ŝi, ĉefe post kiam krepuskiĝis. Vi jam scias ke ŝi suferas enkapan komfuzon post kiam ŝi blindiĝis ĉirkaŭ 90%. Pardonpeto ankaŭ pro la senvervaj anekdotoj. Mankis kontribuaĵoj.

KREDEMULO

Ulo longe sidaĉas en knajpo kaj drinkadas kiam alvenas procesio survoje antaŭ la drinkejo, alte tenante koloran standardon kun sanktulo kun bunta ornamo ĉe la portilo.

“Jen Mangejra!, laŭtege kaj entuzuasme krias la ebriulo.

Nervoze la pastro admonas la ulon: “Kia malrespekto vi, malbeninda aĉulo!

Apenaŭ la pastro finparolis, la sanktulo sur la portilo kunfrapiĝis kun malalta branĉo de mangarbo, falis surteren kaj disrompiĝis.

Aldiris la drinkulo: “Ĉu mi ne avertis? ... sed la pastro montriĝis stresita nervozulo !

- Mangejra=Karnavala societo de Rio.

KUREGU!!

La pasaĝeroj dum longa tempo suferis la varmegon ene de ekironta buso. Fine ĝi komencis moviĝi, por la feliĉo de ĉiuj nur ke, ne en la ĝusta direkto. Ĝi gajnis rapidon sur la deklivo, malsupren. Sinjoro anksie post iris kaj postkuris la buson.Ebriulo el la pasaĝeroj, alkriegis lin: “forgesu, rezignu mia oldulo, vi plu neniam sukcesos enbusiĝi!” ...kaj la postkuranto malespere kaj anhelante: “sed mi estas la veturigisto!!”